

Universitato Adam Mickiewicz (UAM) Poznan, Pollando

Junio 2012

Mirejo Grosjean, Svislando

FAKO: GRAMATIKO Profesoro: M. Farris

LA KVAR DEMANDAJ STRATEGIOJ EN LA FRANCA LINGVO KAJ KOMPARO KUN ALIAJ LINGVOJ

Enhavo

1. Enkonduko, difinoj
2. La kvar strategioj de la franca lingvo
3. Ki-demandoj kaj chu-demandoj
4. Tiklaj aspektoj
5. Komparoj
6. Konkludo
7. Bibliografio

Enkonduko

Laŭ mia supozo ĉiu lingvo havas ian strategion por demandi. Demandi ĉu, demandi pri io. Same kiel nea formo, ordo, pasinteco, estonteco, ŝajnas al mi, ke tiuj strategioj nepras. Male mi tute akceptas, ke iuj lingvoj ne havu artikolon, viran – virinan formon, ktp. Demandoformo utilas, kiam oni volas scii pli. Tiu formo do aperas en interparolado. Ĝi povas aperi en pripenso, en filozofia teksto, kiel ekzemple „Esti aŭ ne esti?” de Hamlet, Shakespeare. En tiu kazo oni demandas al si mem.

Difinoj

Estas du tipoj da demandoj:

Kompleta demando: *ĉu vi venos?*

Parta demando: *kien vi iros?*

En Esperanto ni kutimas paroli pri *ĉu-demando* kaj *ki-demando*.

La kompleta demando venigas respondon *jes* aŭ *ne*. Tamen ĝi povas ricevi respondon: *mi ne ankoraŭ scias, eble, povas esti,...*

La parta demando enhavas demandovorton. La respondo estos ia preciza petita indiko, ekzemple loko, momento, kialo... Tamen ankaŭ tiu formo povas ricevi respondon: *mi ne scias...*

La kvar strategioj de la franca lingvo

En la franca lingvo ekzistas kvar strategioj por demandi.

- a) La postmetado de la subjekto.
- b) La postmetado de la subjekto-pronomo kun konservado de la subjekto-substantivo antaŭ la verbo; temas pri tiel nomata demandoformo kun duobla subjekto.
- c) La uzo de formulo „est-ce que”.
- d) La demando produktita nur pere de voĉolevado.

La postmetado de la subjekto povas ĉiam okazi, kiam la subjekto estas pronomo. *As-tu fait ton travail? Pourquoi fais-tu tant de bruit?*

Ĝi povas okazi kun subjekto-substantivo, se ekzistas demandovorto kaj se nenio alia sekvas la subjekton. *Quand part le train?* Tiel la frazo aspektas iel ekvilibrigita, kun tri partoj kaj centra verbo. Erara estas la frazo *Quand travaillent les étudiants pour cet examen?* Tio koncernas la demandovortojn *où, quand, comment* kaj *combien*.

La demandoformo kun duobla subjekto abundas en la skriba lingvo kaj en prelegoj, paroladoj legataj. Ĝi aspektas, sonas digne kaj noble. En la parola komunikado ĝi apenaŭ aperas. *Le parlement va-t-il accepter cette loi? Quand le gouvernement va-t-il enfin réagir aux protestations populaires?*

Post *pourquoi*, tiu formo estas deviga, se la subjekto estas substantivo. *Pourquoi le train ne part-il pas?* Erara estas la frazo *Pourquoi bavardent les élèves?*

La uzo de la formulo „est-ce que” tre oftas en la parola komunikado. Oni povas same bone uzi ĝin skribante. *Est-ce que tout le monde a compris? Où est-ce que j'ai oublié mes clés?* *Est-ce que* staras komence de la frazo. Nur demandovorto aŭ frazparto entenante demandovorton kiel *quel* aŭ *combien* (sintagmo) rajtas stari antaŭ tiu formulo.

La demando povas esti produktita nur per voĉolevado. Tio oftas en la parola komunikado. Tion oni legas en libroj, se la verkisto raportas konversacion.

Tu viens? Tu fais quoi? Il vient, ton frère?

Tiu formo ne estas tre nobla, tre digna. Se oni parolas al iu moŝtulo, oni evitu ĝin. Oni evitu ekzemple: *Vous habitez où?*

Oni povas plej bone kompreni la diversajn aspektojn de la demando en la franca lingvo per tabelo.

	Sen demandovorto	Kun demandovorto
Postmetado de subjekto	<i>Arrive-t-il bientôt?</i>	<i>Quand dira-t-il enfin ce qu'il pense?</i>
Duobla subjekto	<i>„Paris brûle-t-il?” (titolo de libro)</i>	<i>Où ont-ils rangé les outils?</i>
„Est-ce que”	<i>Est-ce que Marie a compris?</i>	<i>Pourquoi est-ce que Jules réclame toujours?</i>

Voĉlevado	<i>Tu viens?</i>	<i>Il arrive quand?</i>
------------------	------------------	-------------------------

Ki-demandoj kaj ĉu-demandoj

En Esperanto la kutima esprimo por tiuj du tipoj da demandoj estas ki-demandoj kaj ĉu-demandoj. Ki- aperas en ĉiu demando-vorto. Ĉu similas al la franca „est-ce que”. Ĉu estas ia magia formulo, kiu faras el iu frazo demandon.

Tiklaj aspektoj

En la franca aperas tikla aspekto pri strukturo de postmetado de subjekto. Se la subjekto estas substantivo, la frazo nepre finiĝu post tiu subjekto. *Quand part le train?* Tamen tio ne koncernas ĉiujn demandovortojn.

En la franca aperas tikla aspekto pri *pourquoi*. La supre menciita ekvilibra formo el tri sintagmoj ne eblas post la demandovorto *pourquoi*.

En la franca la postmetado de la subjektopronomo ne eblas kun pronomo *je*.

Jen erara frazo: *mange-je des pommes?*

Tamen eblas diri: *Vais-je le réprimander? Dois-je payer cette somme aujourd'hui? Puis-je vous aider? Que sais-je? Suis-je si vieux que vous me cédez votre place?*

Pri „est-ce que” oni devas rimarki, ke ĝi devas stari komence. Se estas demandovorto aŭ sintagmo kun demandovorto, tiam la formulo staras en dua pozicio. Tamen aldonendas la rimarko, ke malklareco naskiĝas, kiam la demandovorto estas *qui*. *Qui* povas esti kaj subjekto kaj objekto, ĉar ne ekzistas en la franca ia akuzativo. Jen ekzemploj: *Qui a dérangé mon sommeil?* *Qui* estas subjekto. *Qui vois-tu au sommet de la montagne?* *Qui* estas objekto. Se venas „est-ce que”, oni devas iom adapti. *Qui est-ce qui a dérangé mon sommeil? Qui est-ce que tu vois au sommet de la montagne?* La demandoformulo pri *qui* subjekto fariĝas *qui est-ce QUI*.

Same kaj paralele ekzistas *qu'est-ce qui?* (subjekto) kaj *qu'est-ce que?* (objekto)

Komparoj

Kiel oni povis vidi, la demandoformo en la franca estas aparte komplika, ĉar ĝi havas 4 malsamajn formojn. Lernantoj devas lerni tiujn aspektojn.

En la germana lingvo ĉiam uzatas la postmetado de la subjekto.

Kommst du jetzt? Kommt der Zug vor 12 Uhr? Wann ist sie geboren? Wem hat der Lehrer diese Hefte gegeben?

En la angla lingvo aperas foje helpoverbo *to do*, foje ĝi ne devas aperi.

Lernantoj devas lerni tiun punkton.

Are you happy? Do you speak english? Where are you? When do you stay in London?

En la japana lingvo aperas –*ka* fine de la frazo aldonita al la verbo.
O genki desu ka? Eki wa doko desu ka?

Do la demandoformo povas esti atingita aŭ per aldono de vorto, partikulo, aŭ per vortordo tipa, aŭ per uzo de helpverbo, aŭ per uzo de la voĉo. Eble ekzistas aliaj strategioj en lingvoj, kiujn mi ne konas.

Lingvoj kun **KAJ** DEMANDOFORMO **KAJ** DEMANDOVORTO
Lingvoj kun **AŬ** DEMANDOFORMO **AŬ** DEMANDOVORTO

Tio estas la centra punkto de mia komparo.

En la franca, germana, angla kaj japana, staras en la frazo KAJ demandoformo KAJ demandovorto.

En Esperanto staras AŬ demandoformo per *ĉu* AŬ demandovorto *ki-Ĉu vi komprenas? Ĉu Karlo venos? Kiu ne komprenas? Kiun Karlo invitis?*
Ne eblas meti kaj *ĉu* kaj *ki*-vorton en la saman frazon.
Tio montras la simplecon kaj efikon de Esperanto.
Ne eblas redundanco.

Konkludo

La demando estas nepra formulo en ia lingvo. Tamen la strategioj por atingi ĝin enorme varias de lingvo al lingvo.

Interese estas konstati, ĉu la demandoformo nepras apud demandovorto jes aŭ ne.

Bibliografio

www.bertrandboutin.ca

Grévisse Maurice: „Petit Précis de Grammaire Française” (1939)

Wennergren Bertilo: „Detala Gramatiko de Esperanto” ILEI, E@I, 2010

Rimarko: Mi nuntempe restadas en Japanio kaj miaj libroj estas en Svislando. Pro tio mia bibliografio estas iom mallonga.